



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

Nº 23

MARÇO DE 1977

BOLETIM INFORMATIVO

Redação: MARIA ALMADA

ELEIÇÃO NO B. K. E.

Consoante fizemos saber pelo nosso Boletim Nº 22, o mandato da atual diretoria do Conselho Brasileiro de Esperanto termina a 8 de junho p. f., e, em consequência deveremos eleger nova diretoria para o mandato seguinte, isto é, que vai de 8/6/77 até 8/6/80.

Até o momento nenhuma das sociedades que compõem o Conselho se manifestou sobre o assunto e nós precisamos e pedimos que nos sejam apresentadas chapas de candidatos, cuja constituição deverá ser: Presidente, Vice-presidente executivo, Secretário Geral e Tesoureiro. Pelo referido Boletim Nº 22 nós citamos os titulares da diretoria cujo mandato terminará este ano e informamos que pelo § 2º do Artº 9 dos nossos estatutos o mandato da diretoria é de três anos, podendo haver reeleição para mais um período consecutivo. As sugestões, naturalmente feitas pelos mandatários das sociedades constituintes do Conselho, deverão ser enviadas para o atual presidente do Conselho, Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal Nº 31 apartamento 73—CEP 11.100—Santos (SP).

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Informa Servo — Recebemos da Liga Brasileira de Esperanto a interessante comu-

nicação que, a seguir transcrevemos, sobre o Serviço de Informação (2) alusivo a — **Nações Unidas Edita Documento em Esperanto**, com o seguinte texto:

“O Escritório de Informação Pública das Nações Unidas em Nova Iorque acaba de editar, em quinta edição, a tradução para o Esperanto da Declaração Universal dos Direitos Humanos. As edições anteriores vinham sendo editadas às custas da Associação Universal de Esperanto desde 1963. Contudo, não é esta a primeira vez que a ONU tem a iniciativa de publicar alguns de seus documentos na Língua Internacional: em meados de 75 foi editado o relatório sobre o Ano Internacional da Mulher e, em dezembro do mesmo ano, a Declaração sobre a Concessão de Independência aos Povos e Países Coloniais. Como a Associação Universal de Esperanto mantém relações Consultivas com a UNESCO, pode ter um representante na sede da ONU. Para isto nomeou o embaixador Ralph Harry, da Austrália, que acumula também o cargo de chefe de delegação de seu país junto àquele órgão, e fala fluentemente Esperanto.

O embaixador Harry esteve no Brasil, durante o governo Castelo Branco, para tratar do caso do mar das 200 milhas, sobre o qual a Austrália possui os mesmos pontos de vista que o Brasil.

NOVAJ—VICPREZIDANTOJ

Estis nomumitaj vicprezidantoj de BKE la jenaj samideanoj, kiuj, oni esperas, fariĝos bonaj kinlaborantoj laŭ la elektitaj fakoj:

Pro—ro Euclides Caripuna Soares, el Belém (PA)— por la fako “Skolta Organizado”; S—ro Kardec Rangel Velloso, el Itanhaém (SP) — “Propagando pri Esperanto”; Prof—ro Nelson Silveira, el São Paulo (SP) — por “Antikvaj Brazilaj Poetoj; kaj D—ro Modesto Belmonte de Abreu, el Pôrto Aletre (RS) — por la fako “Jurnalismo”. Ni gratulas la novajn kunlaborantojn dezirante efikan laboron!

-----xxx-----xxx-----

NI SCIIGAS. . .

PELOTAS (RS) — Nia kara samideano kaj vicprezidanto, D—ro Paulo Domingos Caruso sendis al ni kserografion de interesaj artikoloj: unu, de li verkita kaj alia de D—ro Modesto Belmonte de Abreu, ambaŭ publikigitaj de “Diário Popular, el Pelotas (RS). Dankon pro la sendaĵo.

RIO LARGO (AL) — Sendita de D—ro Esequias Alves ni ricevis eltranĉaĵon de la “Gazeta de Alagoas”, enhavanta artikolon karese pritraktantan la datrevenon de nia Majstro, okazintam en la 15-a de decembro. Ni dankas kore.

FORTALEZA (CE) — Nia kara vicprezidanto Prof—ro Paulo Amorim Cardoso cê Federacia Universitato de Ceará, kie ekzistas oficiala kurso de Esperanto, sciigas nin, ke la Esperanto—Kurso per korespondado liveras diplomojn, kaj la interesatoj devas sin turni al li laŭ la Poŝkesto 1221-60.000—Fortaleza (CE). Al tiuj kiuj ne povas viziti kurson de Esperanto ni konsilas partopreni tiun de la Universitato de Ceará, kiu jam de kelkaj jaroj liveras diplomojn al siaj gelernantoj. La tuta kurso kostas Cr\$ 150,00, inkluzivante la materialon.— Antaŭen!

SÃO MIGUEL PAULISTA — De noster vice-presidente, Dr. Oswaldo Pieres de Holanda, ricevem a aĝradável notíçia da criação de um curso de Esperanto na sede social de Esperanta Klubo Zamenhof, sito à rua Idioma Esperanto nº 363, em São Miguel Paulista (SP), cuja inauguração ocorreu a 27 de fevereiro último, tendo sido registrada a inscrição dos seguintes alunos: Maria Wanda Moreira da Silva, Edson Alves Carneiro, Valdê Moreira da Silva, Francisca Maria Lima, João Alves Silva, Luís Gonzaga de Araujo, Maria Isabel Martins da Silva, Denilda Pereira da Silva, Benedito Wolney Borges de Freitas, Delma Martins Ferreira, Nivaldo da Silva Chaves, Padre Plínio Silva, Lenita Souza, Emerson Moreira de Holanda, Wilson Ferreira da Silva, Cleusa Aparecida Machado, Magnólia Pires de Souza, Maria Moreira de Oliveira, Sirlei Teixeira de Oliveira, Cleber Moreira de Holanda, Douglas Ferraz, Walderez Oliveira dos Santos, Vilma Alves da Cruz, Maria das Graças Oliveira, Marileide Cardoso e Rosa Moreira de Holanda.

O curso, o primeiro de 1977, é realizado sob a direção do noster vice-presidente, Dr. Holanda, que certamente pela sua competência, diplomará esta bela turma de futuros “samideanos”, a fim de poder entrar em contato com o mundo esperantista nos quatro quadrantes da Terra. Congratulamos com o mestre e seus alunos!

-----xxx-----xxx-----

SANTOS (SP)

XII SEMINÁRIO DE ESPERANTO — Os primeiros passos destinados à realização do XII Seminário de Esperanto já estão sendo dados por elementos do Centro Esperantista de Santos, onde deverá ocorrer o evento, sob o patronado do Exmo. Sr. Dr. Antonio Manoel de Carvalho, digníssimo prefeito da cidade. Ao ensejo ocorrerá a inauguração da Praça Esperanto,

cuja denominação foi aprovada pelo Decreto Nº 4795, de 16 de Março de 1976, do aludido Patrono.

A Cooperativa Cultural dos Esperantistas, promotora do certame e coordenadora dos trabalhos, distribuirá brevemente o primeiro boletim alusivo ao Seminário com os primeiros informes, acompanhado do documento de adesão.

Esperamos que nossos coidealistas não meçam sacrifício, se secrefício for uma pequena estada em nossa querida Santos, à beira-mar postada, para um pequeno repouso inebriado de cultura, em prol da causa do Esperanto.

Santos saberá acolher seus irmãos de outras plagas com bastante carinho e amor, proporcionando-lhes agradável permanência com certeza.

PELOTAS (RS) — Subskribitan de nia vicprezidanto, D-ro Paulo Domingos Caruso kaj de la sinjoroj Prof-ro Evandes Barbosa kaj D-ro Claudiomar Barcellos, ni ricevis inviton partopreni la kunvenon por la fondo de la Esperantista Societo de Pelotas, okazinta en la 12-a de marto, 1977, sed ne povante ĉeesti tiun kunvenon nia prezidanto telefone faris salutvortopn al D-ro Paulo, petante ke li en la nomo de BKE kaj de ĝia estraro reprezentu la invititojn, dezirante sukceson kaj prosperon al la nova societo. Ni esperas, ke aliloke oni imitu la amikojn el Plotas, starigante novajn societojn en nia kara lando.

-----xxx-----xxx-----

GAZETOJ RICEVITAJ — Ni ricevis kaj dankas la jenajn gazetojn: El Jugoslavio - "ZET", kiu ĉiam enhavas esperantajn sciigojn tre interesajn. El Brazilo mem: "A Candeia", "Esperanto Aldono", "Tribuna de Indaiá", "Gazeta da Bahia", kaj "Diário Popular (Pelotas). Tiuj gazetoj pritraktas ĉiam la movadon esperantan kun granda atento. Gratulon al ĉiuj!

-----xxx-----xx-----

SAN-PAULO (SP) — Nia vicprezidantino ekzekutiva, F-ino Elvira Fontes, sciigis nin ke ŝi fariĝis sekciestrino de ILEI — Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj-en Brazilo. Ĉiuj instruistoj, kiuj deziras aliĝi al tiu Societo, bonvolu sin turni al F-ino Elvira Fontes, Poŝtkesto 5.888 CEP 01000 — São Paulo (SP). Oni devas pagi nur Cr\$ 8,00 - kaj povas tion fari per poŝtmarkoj.

La Franca selcio de ILEI, kies prezidanto estas S-ro F. Le Magadure — 23, rue Jules Ferry — 56.700 — Hennebont — Francio, petas ke oni sendu korespondadojn al S-ro Emile THOMAS — 18, rue de l'Iroise — 29200 — BREST — Francio, precipe pri pedagogio aŭ aliaj temoj.

INFANA KONKURSO

En la monato februaro, en la kadro de la Semajno de Internacia Amikeco, okazis konkurso pri infanaj desegnaĵoj. La temo estis "Amikeco inter la Popoloj", kiun partoprenis etuloj de 8 — 12 jaraĝaj. La konkurson organizis nia vicprezidantino Prof. Elvira Fontes, prezidantino de São Paulo Esperanto-Asocio. La premioj aljuĝitaj estis portugallingvaj infanlibroj.

LIBROVENDEJO ESPERANTO

Oni ne forgesu, ke la Librovendejo Esperanto vendas, ĉu nacilingvaj, ĉu esperantajn librojn, diskojn kaj aliajn esperantaĵojn. Ni invitas la esperantistaron viziti ĝian butikon kaj aĉeti la bezonatajn librojn, helpante tiamaniere la Esperanto-movadon.

-----xxx-----xxx-----

EKSTERLANDAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

La 62-A UNIVERSALA KONGRESO DE UEA

Ĉijare la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Islando, en ĝia ĉefurbo, Rejkjaviko, de la 30-VII ĝis la

6-a-VIII-1977. La sodejo de tiu kongreso estas mistera insulo, tre alloga, kiun multaj konas, kaj certe la kongreso iĝos granda kaj impona evento.

La alta protektanto de la UK, D-ro Kristján Eldjárn, persone ĉeestos la solenan inaŭguron kaj poste akceptos la landajn reprezentantojn en sia Prezidenta Rezidejo.

LA 50-A KONGRESO DE SAT

La Sennacieca Asocio Tutmonda, ankău ĉijare kunvenos en Germanio, en la urbo Augsburg, de la 30-VII ĝis la 5-a-VIII-77. Tiu sodejo de la kunveno estas urbo tre antikva, kvazaŭ muzeo.

-----xxx-----xxx-----

MONHELPO

Ni ricevis kaj kore dankas la jenajn kontribuojn de la sindonaj samideanoj:

Braz Cosenza	Cr\$ 200,00
Bahaa Esperanto-Ligo	50,00
Ceará Esperanto-Asocio	50,00

JUNULARA ANGULO

KION VI SCIAS PRI TEJO KAJ ĜIA AGADO?

Post 39 jaroj da ekziistado, TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (la junulara sekcio de UEA) povus fieri pri sia laboro. Fakte multaj el la plej elstaraj gravuloj de la nuna "plenaĝula" movado iam aktivis en la kadro de TEJO, dum sia junaĝo. Sufiĉas nur unu ekzemplo por pravigi tiun aserton: la nuntempa prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kiu jam estis prezidanto de TEJO. Ĝi rolas, do, kvazaŭ maturejo por la malpli aĝaj esperantistoj. Nur pro tio ĝi jam estus subteninda, sed

vi certe ne hezitos apogi ĝin post analizi la amplekson de ĝia agado: Interalie, TEJO funkciigas la PAS-PORTAN SERVON, kiu aranĝas senpagan gastigadon por junuloj dum internaciaj vojaĝoj; per KOMISIONO DE EKSTERAJ RILATOJ ĝi kontaktas ne-esperantistajn junularajn organizaĵojn kaj proponas Esperanton kiel solvon por ilia lingvo-problemo; ĝi organizas ĉiujare la INTERNACIAJN JUNULARAJN KONFERENCJOJN, alte respektatajn en nia movado; ĝi eldonas la revuon KONTAKTO, kiu ĉefe prezentas seriozajn ne-movadajn temojn, kaj multe pli. AKTIVAJ JUNULOJ KUNLABORAS KUN TEJO — CELKONSCIAJ PLIAĜULOJ FINANCE APOGAS ĜIN!

Kaj vidu kiom malmulte kostas:

- 1) Persono ĝis inkluzive 25 jaroj povas aliĝi al UEA kiel MA (Membro Abonanto), kaj estos automate aliĝinta al TEJO. Tiu ricevos la monaton revuon ESPERANTO, JARLIBRON kaj KONTAKTON. Ĉio kostas nur Cr\$ 150,00.
- 2) Sed kontraŭ nur Cr\$ 60,00 vi rajtas kaj ricevas same al MA, escepte de revuo ESPERANTO. Temas pri la kategorio MJ (Membro kun Jarlibro).
- 3) PATRONA MEMBRO estas pli ol 25 jaraĝa konsciulo, kiu finance helpas TEJO-n, elpoŝigante nur Cr\$ 90,00! Memoru ke vi investas en la estonteco de nia movado!
- 4) Simpla abono de KONTAKTO, sen membreco al TEJO: Cr\$ 45,00. PETU ALIĜILON AL LA LANDA PERANTO: KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ (Av. 13 de Maio 47, SL/208, Rio, RJ, 20.000)

ALAN ROMERO
KOMITATANO DE TEJO

LINGVAJ PRIKOMENTOJ

Dragutin Wranka (Argentino) Daŭrigo.

Vortordo — La vortordo en Esperanto estas libera kiel en kelkaj naturaj lingvoj. Ne ekzistas ia fiksa vortorda regulo. Oni devas klopodi skribi klare kaj laŭeble bone. Sekvi jenan normon: subjekto, predikato, objekto kaj adjekto. Tamen tiun normon oni ofte devas ŝanĝi, konformigi al la natura irado de l'penso. Tiun ŝanĝblon ni dankas al la akuzativa finaĵo, al la litero "n", kiu garantias la rekonon de la senco kaj ebligas nei aŭ akcenti iun frazelementon.

Oni devas nepre observi la regulon: ĉiu frazelemento staru apud tiu al kiu ĝi senpere rilatas. Specialan atenton meritas tiurilate la vorteto "ne". En la ĉi-suba pritrakto mi montros kelkajn ekzemplojn el kiuj ni povos vidi kiel tio funkcias en la praktiko. Mi korektos kelkajn malĝustajn frazojn, jenajn, kiuj pekas kontraŭ la normala ordo de vortoj kaj tiel povas eĉ ŝanĝi la senco de l' frazo. Alivorte ni lernos pere de eraroj. Ekzemple, la verkinato de jena admono "Oni ne devas tie ĉi fumi" certe ne celis diri tion, ke ne estas devigo tie ĉi fumi, sed tion efektive la senco diras, ke ne estas devigo aŭ devo, tie ĉi fumi. Kulpas la neĝusta loko de la vorteto "ne". Se oni metas ĝin en la ĝustan lokon la frazeto tuj havas senco t. e. ke oni devas ne fumi tie ĉi. Do, neiel "ne devas sed devas ne". La vorteto "ne" devas ĉiam senpere stari antaŭ la vorto, kiun ĝi koncernas kaj neas. Do "ne fumi" kaj ne "ne devas fumi".

Pliaj ekzemploj: "Ne ĉio, kio brilas estas oro". "Ne vi devas diri tion" sed "vi devas ne diri tion". Ne: "tio ne estis mia kulpo" sed "tio estis ne mia kulpo". "Ne tute bona" oni komparu kun "tute ne bona" kaj rimarkas la diferencon. Alia ekzemplo: "Mi ne tute vidas lin" signifas mi vidas nur parton de li, ĉar li eble staris duone malantaŭ arbo. Sed diri "mi

tute ne vidas lin" signifas stari tiel ke oni absolute neniam vidas de li. Do oni distingu inter "ne tute" kaj "tute ne". Dank' al la libera vortordo en Esperanto oni povas en la frazo akcenti ĉiun frazelementon. La **subjekton** oni akcentas per tio, ke oni faras el ĝi apartan propozicion kun "estas", kaj el la predikato oni faras subpropozicion. Ekzemple: "Paŭlo (subjekto) aranĝis (predikato) la aferon". Por akcenti la subjekton "Paŭlo" oni procedas jene: "Estis Paŭlo, kiu aranĝis la aferon". La predikato "aranĝis" forglitis en la subpropozicion, kaj la subjekto Paŭlo estas akcentita.

Alia ekzemplo: La frazo "liaj amikoj perfidis lin". Por akcenti la subjekton "liaj amikoj" oni procedas same. "Estas liaj amikoj, kiuj perfidis lin". La predikato "perfidis" staras nun en la kreita subpropozicio. "Mi ne pagos la ŝuldon" aŭ "Estas ne mi, kiu pagos la ŝuldon". — Superflua estas tio, se la subjekto estas jam akcentita per "mem": "Paŭlo mem aranĝis la aferon". Se la subjekto estas persona pronomo, sufiĉas ĝin postmeti al la predikato: "La aferon aranĝis (predikato) mi (subjekto). Ni jam sufiĉe penis, nun peni ili. En la dua propozicio de frazo oni same povas akcenti la subjekton per postmeto: "Mi atendis Petron, sed venis lia frato". Sen tiu postmeto la frazo estus "Mi atendis Petron, sed lia frato venis".

Ankaŭ la **objekton** oni akcentas per antaŭmeto al la subjekto plus predikato. "Vi faris al mi grandan ĉagrenon". Post la antaŭmeto la frazo aspektas jene: "Grandan ĉagrenon vi faris al mi". La frazo "Mi ne timas kondamnon, mi avidas nur venĝon". Post antaŭmeto la frazo aspektas jene: "Kondamnon mi ne timas, nur venĝon mi avidas. Ankaŭ la frazo: "Eĉ muŝon li ne povis vidi suferi".

Zamenhof ofte antaŭmetas infinitivan objekton: "Uzi tion ni devas ĉiam eviti".

La **predikaton** oni akcentas metante ĝin antaŭ la subjekton: "Kuregis la knabo per sia tuta forto, sed li ne povis atingi la papilion".

La **epitetojn** oni akcentas kutime per postmeto. Do, ne: "tio estas absurda supozo" sed "tio estas supozo absurda (epiteto). Aŭ ĵena: "brilan vi havos sukceson" anstataŭ "brilan sukceson". . . Aŭ:

"Li loĝas en granda domo". Post la akcento: "Li loĝas en damo granda". Kiel oni vidas la loko de l' plej forta akcento estas la komenco de la frazo; tiu akcento tamen ne validas por la subjekto, ĉar tie ja estas ĝia loko kutima. Alia akcenta loko estas la fino de la frazo. Precipe validiĝas tiu akcento por la unusilabaj vortoj, ĉar ili sekvas tie sen akcentan silabon kaj post ili sekvas frazo. Sed tia akcento por la vortoj min, vin, lin, ŝin, ĝin, nin, plej ofte ne estas dezirinda. Krome ili estas oftaj elementoj, kaj se oni metas ilin frazfine povas okazi ke pluraj sinsekvaj frazoj finiĝas per ili, kio donas monotonan kaj ne bonvenan rimadon. Zamenhof men atentigis pri tio. Oni do loku tiujn vortojn kvazaŭ en ombro, plej oportune antaŭ la predikato: "Multaj homoj lin akompanis". "En granda mizero mi lin trovis". En ambaŭ frazoj la vorteto "lin" estas interne de la frazo. Post la predikato nur, se sekvas ankoraŭ frazelementoj:

"Multaj homoj akompanis lin en la tombejon. Mi trovis lin en granda mizero. Precipe volonte antaŭmetas Zamenhof la pluralan personprononon: "mi ilin vidis".

(Daŭrigota)

Kiu Esperanton perfekte uzas, tiu pleje honoras la memoron de nia Majstro.

Kiu Esperanton fuŝe uzas, tiu nescie ĝin mokas.

Unu, du, tri, kvar,

fisôj naĝas en la mar'

kvin, ses, sep, ok

birdoj staras sur la rok'

naŭ, dek, naŭ dek

unu fiŝ' en ĉiu bek'.

ALTO PARAISO (GO)

Nia vicprezidanto Grattapaglia informas: Okaze de la **Semajno de Internacia Amikeco**, en februaro, oni inaŭguris sur Monteto Zamenhof en Bona Espero, la buston de Zamenhof ricevita donace de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Ĉeestis la "familian" ceremonion, ne nur la bonesperanoj, sed ankaŭ esperantistaj gastoj el Rio de Janeiro, San-Paŭlo kaj Gojania.

Fine de februaro komenciĝis en la vilaĝo Alto Paraíso la dua jaro de la gimnazio starigita pasintjare. El la ses oficialaj geinstruistoj, kvar loĝas en Bona Espero kaj sekve la kontribuo de la esperantistoj estas esenca por la plialtigo de la eduka nivelo de tiu regiono en centra Brazilo.